



VT 34 - MARS 2013

la verda Triskelo



2 numéros par an, parution :
Printemps-Automne

Le 17 MARS
Assemblée Générale
à
LOUDEAC
(voir pages 3 et 4)

Legu pri la okazintaĵoj
kaj la
okazontaĵoj
Agenda au verso

Les rencontres internationales
de PLOUEZEC
du 17 au 24 août 2013
Même pour les tout-débutants et les enfants !

Artikoloj por la sekva
Verda Triangulo

Sendu al bert.schumann@gmail.com

Enhavo

• Edito	p. 2
• La Federacio	p. 3,4
• El niaj kluboj	p. 5,6,7
• Bretona tradicio	p. 8,9
• Tri lingva rakonto	p. 10,11
• Aktivajoj de Interkant'	p. 12,13
• Vojaĝi dank'al Eo	p. 14
• Studperiodoj	p. 15
• Agenda	p.16

Cotisation 2013

Y avez-vous pensé ?

Une croix rouge dans cette case indique
que vous n'êtes pas à jour de votre
règlement.

Même si vous ne suivez pas de cours,
même si vous n'êtes pas actif,
soutenez l'espéranto et restez informé.

Adressez-vous à votre correspondant local si
vous appartenez à un club. Pour adhérer à la
fédération uniquement adressez-vous au
trésorier Yves Royou 155 allée de Trémaria
29800 Landerneau.

Aux internautes

Site Internet :

<http://bretonio.esperanto-france.org/>

Pour vous inscrire à la liste de diffusion
Bretonio, et ainsi recevoir des nouvelles, plus
fraîches et plus nombreuses, envoyez un
message vide à l'adresse :

bretonio-subscribe@yahoo.fr

Redakcio : Jannick Huet-Schumann - 02.99.83.69.86 - jannick.huet@free.fr - 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné
N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles dès maintenant pour les voir apparaître dans le VT N° 35
(par courrier ou par internet).

E D I T O

Esperanto, kultura lingvo de 1887!

Vi certe jam aŭdis la oftan kritikon, ke Esperanto ne povus funkcii ĉar ĝi ne havus kulturon. Tamen, ekde ĝia naskiĝo kulturo estas fundamenta karakterizo de Esperanto. Antaŭ publikigi la "internacian lingvon", Zamenhof elprovis la lingvon per tradukado de kulturaj tekstoj kaj la *unua libro* jam entenis poemojn. Tio klare montras ke ekde ĝia lanĉo, por la fondinto de la lingvo, Esperanto nepre estu kultura lingvo. La sekvo de la historio de Esperanto daŭrigis kaj ampleksigis tiun aspekton, kun multaj tradukoj de plej elstaraj libroj el diversaj lingvoj.

Kaj nun kiel stas la situacio pli ol 125 jaroj poste? Inter notindaj aktualaj atingoj, Esperanto estas la 32^a lingvo en la enciklopedio Wikipedia laŭ la nombro de artikoloj. Eĉ esperantistoj ne sufiĉe konscias kiom mirinda estas tia realigo. Ĉar estas ja mirinde atingi tian rangon, por 125 jar-aĝa lingvo, en mondo kiu entenas pli ol 6000 lingvojn, kiuj estas plejparte pli aĝaj.

Kio do animas la entuziasmon de Esperantistoj por atingi tian sukceson? Estas la kulturo de Esperanto! Mi do invitas vin legi tiun revuon, kun tiu ideo en via menso, kaj vi mem konstatos ke en ĉiu paĝo temas pri kulturo: kulturaj interŝanĝoj, traduko de kulturajĵoj, historiaj rakontoj, artaj realigoj ktp. Vivu do Esperanto, kultura lingvo de 1887!

Xavier Godivier

Legu ankaŭ la lastan Le Monde de l'espéranto: "Espéranto et culture, 125 ans".

Espéranto, langue de culture depuis 1887 !

Vous avez sûrement déjà entendu la critique selon laquelle l'espéranto ne pourrait pas fonctionner car il ne posséderait pas de culture. Et pourtant, dès son apparition la culture est une caractéristique fondamentale de l'espéranto. Avant la publication de la "langue internationale", Zamenhof avait "testé" la langue au moyen de traduction de textes culturels et le premier livre *unua libro* contenait déjà des poèmes. Cela montre clairement que dès son lancement, pour le fondateur de la langue, l'espéranto devait par-dessus tout être une langue de culture. La suite de l'histoire de l'espéranto n'a fait qu'amplifier cet aspect, avec de nombreuses traductions de livres célèbres depuis diverses langues.

Où en est la situation aujourd'hui plus de 125 ans plus tard ? Parmi les réalisations les plus visibles aujourd'hui, l'espéranto est la 32^e langue de l'encyclopédie Wikipédia selon le nombre d'articles. Même les espérantistes n'ont pas suffisamment conscience de l'importance d'un tel aboutissement. Car c'est en effet extraordinaire d'obtenir un tel rang, pour une langue qui n'a que 125 ans, dans un monde qui contient plus de 6000 langues, pour la plupart bien plus anciennes.

Qu'est-ce qui anime donc l'enthousiasme des espérantistes pour arriver à un tel succès ? C'est précisément son caractère culturel ! Je vous invite donc à lire cette revue avec cette idée dans votre esprit et vous verrez qu'à chaque page il s'agit de culture : échanges culturels, traduction de contenus culturels, récits historiques, réalisations artistiques etc. Vive donc l'espéranto, langue de culture, depuis 1887!

Xavier Godivier

Lisez également le dernier numéro du Monde de l'espéranto : "Espéranto et culture, 125 ans".

Responsables des clubs (ou antennes) bretons

VT sendado	Manjo Clopeau 12 rue de la Drisse 56450 Theix	02.97.68.98.57	manjo.clopeau(a)gmail.com
Armor-Esperanto	Laurent Peuch	02.96.78.29.70	ltpeuch(a)hotmail.com
Hennebont	Yvette Veslin	02.97.36.08.75	herve.veslin(a)orange.fr
Lorient	Gaëll Collin	06 69 72 81 82	gaellcollin(a)hotmail.fr
St Brieuc	Alain Le Mau	02.96.63.91.32	alainlemau(a)orange.fr
Plouézec	Jeanne Pouhaer	02.96.20.68.07	pluezec(a)gmail.com
Rencontres de Plouezec	Jean-Claude Dubois	02 96 35 73 06	marbordo(a)gmail.com
St Quay Perros	Gaby Tréanton	02.96.23.02.63	gaby.treanton(a)wanadoo.fr
Guingamp	Anne Desormeaux	02.96.35.83.25	anne_desormeaux(a)yahoo.fr
Quimper	Pierre Le Vern	02.98.56.21.94	plevern(a)wanadoo.fr
Morlaix	Nicole Rizzoni	02.98.88.62.57	nicole.rizzoni(a)wanadoo.fr
Vannes	Mathieu Thépaut	02.97.63.30.08	mathieu-thepaut(a)live.fr
Rhuys	Francis Desmares	02 97 26 89 96	sicnarf56(a)free.fr
Pontivy	Marielle Giraud	02.97.27.76.98	liber.terre(a)wanadoo.fr
Rennes	Xavier Godivier	09.53.17.02.55	zav(a)esperanto-panorama.net
St Malo	A-Marie Argney	02.99.40.24.86	amargney(a)wanadoo.fr
Chartres de Bgne	Claude Bros	02 99 41 11 51	claud.bros(a)laposte.net
Plestin les Grèves	Étienne de St Laurent	02.96.35.76.64	etienne.dsl(a)wanadoo.fr
Collinée	Pierre Cardona	02.96.30.23.94	kortep(a)gmail.com
Landerneau	Gabriel Quééré	02.98.85.27.94	quere.gabriel(a)orange.fr
Plélan le Petit	Bernadette Lemarchand	02.96.27.67.49	lemarchand.bernadette(a)wanadoo.fr
Dinan	Philippe Stride	02.96.27.87.43	philippe.stride(a)gmail.com
Montfort-sur-Meu	Josette Duclouyer	02.99.09.71.92	jpducloy(a)club.fr
Herbignac	J-Y Santerre Duret	02 40 22 00 98	jys.mys(a)club.fr
Nantes	Lucette Echappé	02.40.04.46.02	sabato(a)live.fr
St Nazaire	Chantal Barret	02 40 01 97 27	patchdomo(a)yahoo.fr

NOVA !

Federacio

ASSEMBLÉE GÉNÉRALE DU DIMANCHE 17 MARS 2013 de 9H à 17H à la salle Malivel de Loudéac *Rappel de l'ordre du jour:*

9H Accueil et mot du président

Rapport d'activité 2012

Rapport financier

Election tiers sortant

Projets 2013

- de la FEB

- des clubs (par les responsables de clubs)

12-14H Repas

Après-midi

14H Suite projets 2013 + Questions diverses

15H30 Diaporama sur le Népal présenté par Hélène Dubois

Libroservo toute la journée, **distribution du VT34**,

Vous pouvez prendre les feuilles d'inscription pour :

La 4ème fin de semaine de St Brieuc 05/05 - 07/05

le stage de Pluzec 17/08 - 24/08

la semaine de printemps à Grésillon 13/04 - 21/04

l'une des 5 semaines d'été de Grésillon entre le 06/07 et 17/08

Rapport d'activités 2012 (année civile)

Nombre de membres 2012 (2011) : 269 (257) dont 253 par l'intermédiaire des clubs locaux.

Montant de la cotisation 2012:

adhérent à une association locale : 7 € par personne,

11€ pour un couple. Membres individuels habitant hors Bretagne : 11€, en Bretagne 20€ (pour inciter les adhérents à s'inscrire par l'intermédiaire d'une association locale).

Scolaires, étudiants, chômeurs : 3,50 €

USAGERS : il s'agit des participants à diverses activités, non adhérents à notre Fédération :

- Rencontres Internationales de Plouézec (110 participants + public lors des soirées culturelles)

- Stages de fin de semaine (131 p.),

- Représentations de théâtre (60 p)

- Soirées-débat ouvertes au public (en 2012, 23 conférences en Bretagne dont 19 d'un Cubain, une conférence d'un Japonais

(100p), d'un Polonais, d'un Ukrainien et d'un Coréen)

- Conférences sur la langue espéranto (2 en 2012)

- Une animation dans le cadre de la Semaine de l'Europe

- Cours d'initiation lors des forums de langue (3 en 2012) ou sur nos stands lors des forums d'associations, foires bio, forums

« partir à l'étranger », forum social etc. (une quinzaine en 2012)

- Expositions, stands (Semaine de l'Europe, forums de langue, forums d'associations...) une quinzaine en 2012.

ENSEIGNEMENT

- Cours hebdomadaires 2012/2013 : 181 élèves répartis dans 12 associations locales

- Stages intensifs organisés à St Brieuc (51 p en 2 stages) et Vannes (80 p en 5 stages)

- Cours d'initiation lors des forums de langues (Lannion, Guingamp, Brest)

- Cours par correspondance auprès d'organismes nationaux

- Cours par internet sur des sites gratuits

I- Actions de la Fédération

- **Edition du Bulletin** de liaison et d'information Espéranto-Bretagne « La Verda Triskelo » 2 fois /an (rédacteur Jannick Huet)

- Edition d'un **bulletin international** une fois par an, la « Verda Triangulo », commun à trois fédérations :

- Fédération Bretagne : le responsable est Bert Schumann

- Fédération de la Région Saxe (Allemagne) : les responsables sont Benoît Philippe et Steffen Eitner

- Fédération de la Région Silésie (Pologne) : la responsable est Teresa Pomorska

- **Organisation de tournées de conférences d'étrangers espérantophones** :

- Du 2 mars au 6 avril 2012, **le Cubain** Miguel Angel Gonzalez Alfonso, dont l'organisation, les frais de voyage et de séjour ont été pris en charge par notre Fédération, est intervenu dans des **soirées-débats ouvertes au public auprès de 19 associations bretonnes**, a participé à notre Assemblée Générale le 25 mars 2012 à Loudéac et est intervenu au congrès national des cheminots espérantophones à Angers du 2 au 4 avril 2012

- Du 23 au 25 mai 2012, organisation de visites et conférences, dans le cadre d'une tournée organisée par Espéranto-France, du **journaliste polonais Roman Dobrzynski**, à Rennes et Montfort-sur-Meu

- **Jumelage**

Relations avec les associations d'espéranto de **Jinan et de Zaozhuang (Shandong)** dans le cadre du jumelage des deux fédérations d'Espéranto de Bretagne et du Shandong

- **Edition**

Pas d'édition cette année. La vente du livre « Anecdotes sur Confucius » trilingue : français-chinois espéranto, ainsi que du CD de chansons bretonnes traduites en espéranto, édités par notre Fédération, se poursuit.

- **Les Choeurs MEVEN et INTERKANT'**

Notre chœur régional MEVEN prépare avec le chœur national **INTERKANT'** une conférence-concert en espéranto sur l'opéra Carmen, sous la houlette de Franjo Lévêque, chef de chœur et espérantophone de St Brieuc, et a participé en 2012 à diverses répétitions, avec mise en scène, avec en perspective des concerts en 2013

- **Internet**

Gestion du **site internet**: <http://bretonio.esperanto-france.org/> de la Fédération par Bert Schumann, bénévole de l'association rennaise affiliée et Manjo Clopeau,

Gestion des inscriptions et de la modération de la liste de discussion de nos membres [bretonio\(a\)yahoogroupes.fr](mailto:bretonio(a)yahoogroupes.fr) par quatre bénévoles.

- **Evénements:**

La FEB effectue directement des animations à la demande, là où n'existe pas d'association locale d'espéranto, par exemple :

- Janvier 2012 stand au **forum "partir à l'étranger"** organisé à La Guerche-de-Bretagne (35) par le Point Information Jeunesse de Vitré et en avril 2012

- Avril 2012 : conférence au **Rotary-Club** de la Guerche

- La FEB joue son rôle de conseil auprès des clubs, participe à la coordination des actions régionales, et recherche des partenaires et des correspondants étrangers. Organisation de **l'assemblée générale**, qui a lieu chaque année en mars.

Federacio (sekvo)

II- Actions de nos associations adhérentes

COTES D'ARMOR :

Accueil, de janvier à septembre 2012, **du jeune lycéen brésilien Igor Ferreira**, en provenance de la ferme-école brésilienne Bona Espero, créée et gérée par des espérantophones.

Accueil, dans le cadre d'une tournée nationale, de **deux Japonais** et organisation d'une soirée-débat sur Fukushima, avec plus de 100 participants

Interventions sur la langue espéranto à la MJC, au lycée Ernest Renan et à l'Université de St Briec.

Organisation de **deux stages** espéranto de fin de semaine, avec **27 et 24 participants**

Participation au festival des langues de Lannion (ENSSAT), au printemps des langues de Guingamp, à la foire BIOZONE.

Projections du film « Espéranto » dans des salles de cinéma à Dinan et St André-des-Eaux et au FJT de Dinan.

Sous-titrage en espéranto du film « le petit jardin des écoliers ». Les **jeunes qui pratiquent le woofing** au « petit jardin des écoliers » participent aux cours d'espéranto.

Partenariat avec diverses associations (ESS, RESIA..).

A Plouézec, du 18 au 25 août, les **16è Rencontres internationales ont réuni 110 personnes d'une dizaine de nationalités**.

Membres d'honneur : le **Népalais** Razen Manandhar et le jeune **Brésilien** Igor Ferreira. 7 niveaux de cours, tourisme, ateliers de théâtre, chant choral, yoga, informatique, jeux de société, dessins celtés, spectacles et concerts.

Les Chinois espérantistes de **Canton** ont organisé en janvier 2012 un mois de stage intensif d'espéranto à **l'île de Hainan** et, à la suite de leur séjour aux rencontres internationales de Plouézec 2011, y ont invité les Bretons. Deux membres des Côtes d'Armor y ont participé.

FINISTERE

Stand au **forum des langues** de Brest.

Rencontre avec l'espérantiste et choriste **gallois Bill Chapman** à Châteauneuf-du-Faou.

Participation au salon multilingue du **Livre Jeunesse** à Pluguffan.

Participations aux actions de **solidarité internationale** dans le cadre du CICODES et de la Mairie de Quimper, à la Fête des

Droits de Toutes les Couleurs à Quimper.

ILLE-ET-VILAINE

- Participation à la **Journée de l'Europe** (9 mai) par une exposition et une conférence sur l'espéranto à l'Hôtel de la Communauté de Communes de Montfort-sur-Meu.

Soirée-débat ouverte au public sur **Cuba** à Rennes, Montfort et St Malo à l'occasion de la tournée du Cubain espérantophone Miguel Angel Alfonso Gonzalez.

- Soirée-débat ouverte au public (24 mai) à Montfort sur la **Pologne**, avec le journaliste polonais Roman Dobzynski, dans le cadre d'une tournée nationale organisée par Espéranto-France, en présence du Président de Montfort-Communauté, de plusieurs maires et représentants de comités de jumelage.

- Soirées-rencontres et repas en commun des espérantophones des clubs de Rennes, Montfort et Chartres-de-Bretagne avec les espérantophones cubain et polonais.

Visites commentées de Rennes en espéranto auprès des étrangers espérantistes.

Correspondance avec un Allemand de **Erlangen**, ville jumelée avec Rennes.

Mise en place d'un **atelier théâtre** par les **jeunes étudiants rennais** membres de l'association Espéranto-Rennes.

Arrivée à Rennes d'un nouvel enseignant pour les débutants, Stéphane Blaevoet. A **Saint Malo**, accueil et conférence d'un espérantophone **Ukrainien**.

- MORBIHAN:

- **Vannes** Les 5 Journées de **stage** « Samedis espéranto » ont attiré plus de **80 personnes**, avec 3 niveaux de cours et divers ateliers. **L'activité théâtre** a débouché sur une représentation lors de la Fête Zamenhof (janvier 2012), avec une soixantaine de spectateurs. Organisation de la « Litera Turo », **concours international de Belles Lettres**. Soirée-débat avec le **japonais Hori Jasuo (sur Fukushima)** et accueil d'un espérantiste.

Coréen. Participation au **Forum Social** de Séné-Hennebont : Dans le cadre du **jumelage** avec la ville allemande de Kronach, accueil d'un espérantiste allemand pendant une semaine et visite de 2 espérantistes de Hennebont dans la ville allemande.

-**Presqu'île de Rhuys** : Présentation du film « Espéranto » dans des salles à Arzon et St Gildas-de-Rhuys.

Rapport financier 2012

Débits exercice	2012	2011
Frais de fonctionnement	184,82	362,14
Equipement audiovisuel	0,00	1 281,16
Edition Verda Triangulo	173,55	69,76
Edition Verda Triskelo	499,22	574,38
Frais d'expédition du VT	32,70	33,40
Frais AG Loudéac	127,69	164,46
Frais de dépl. (Narenda, Kazaks,)	1379,41	709,35
Remb. frais d'examen à Grésillon	100,00	184,00
Stage	0,00	10,00
Subv. à Interkant	0,00	300,00
Assurance	54,80	30,08
Total	2 552,19	3 718,73

Crédits exercice	
Cotisations des clubs	1 669,50
Cotisations individuelles	280,50
Ventes de livres et CD	450,00
Subv. Trésorerie de Rennes	171,00
Part. de 3 clubs du 44 pour Narenda+Kazaks	180,00
Intérêts bancaires	101,42
Total	2 852,42

Compte de résultat		
Dépenses	- 2 552,19	- 3 718,73
Recettes	+ 3 009,60	+ 2 852,42
Bénéfice/Déficit	+ 457,41	- 866,31
Amortissement vidéo (3)	- 427,05	+ 854,11
Bénéfice/ Déficit	+ 30,36	- 12,20

Trésorerie	
Solde compte chèque	1 405,31
Solde livret Bleu	4 556,85
Solde caisse	12,91
TOTAL	5 975,07

El niaj kluboj

Ermeno, emblemo de Bretonio

Ĝi estas malgranda mambesto kiu naskis la devizon kaj la legendon de Bretonio: «Mi preferu morton al makulaĉo».

Oni rakontas ke iun tagon ĉasante, Anne de Bretonio vidis ermenon kiu preferis morton fronte al ĉasantoj anstataŭ makuli sian felon tranaĝonta kantan marĉeton.

Kortuŝita, la Dukino lasis al ĝi ĝian vivon, kaj por memori tiun eventeton ŝi igis ermenon sia emblemo.

Esperantigis Petro, klubano de **Guingamp** dum februaro 2013

Pri Montpasejo de Marhalla

Pri montpasejo de Marhalla, situanta en Boqueho, sur la departementa vojo 24, alta je 284 metroj.

Tie de la 21a ĝis 26a de junio 1591 okazis batalo de Marhalla dum « milito de la Ligo », kiu daŭris de 1589 ĝis 1598, ĝi estis religia kaj politika movado inter liga armeo kiu volis defendi katolikismon kontraŭ protestanta herezo, ĉar katolikistoj volis fortenti la reĝa trono la protestantan Dukon de Navarre (iĝonta Henri la kvara). La tuta bretonia loĝantaro batalis pro sia fido kun la Duko de Mercœur kontraŭ la reĝo.

En Marhalla du armeoj :

Liga armeo kun Duko de Mercœur helpita de hispana armeo : 7600 viroj el kiuj 5900 piede kaj 1700 ĉevale

Reĝa armeo kun Princo de Dombes helpita de angla armeo : 5800 viroj el kiuj 5100 piede kaj 700 ĉevale.

Fine post 5 tagoj la 2 armeoj retiriĝis sen venkintoj, sen venkitoj.

En 1593, Henri IV iĝis katolika. Sed la milito daŭris inter la 2 armeoj kaj ankaŭ banditoj furiozis en la kamparo. Bretonio estis ruinigita, prirabita, la loĝantaro vivis en nigra mizerego kaj volis pacon.

La 13 an de aprilo 1598 la fama edikto de Nantes estis subskribita, la milito estis finita.

Claudine la unua de la klubo de Guingamp
(du Claudine-j riĉigas nian klubon)

Pri « la clairette de Die »

« La clairette de Die tradition » malnova die-a metodo.

Ĝi estas la plej maljuna ŝaŭmvino de Francio, la vinberjo situas sur la montetoj de la valo de la Dromo, ĉirkaŭe de la urbo Die. La « clairette de Die tradition » enhavas du vinbervariojn : moskatelo, minimume 75% kaj « clairette » maksimume 25%.

2.000-jaraĝa, « la clairette de Die » estas natura vino. Dum antikveco, en 73, Pline la Maljuna parolis pri ŝaŭma, natura vino fabrikita de la popolo « Voconces » kaj nomita « algleucos » praŭla vino de la clairette.

Laŭ la legendo, vinberkultivisto, revenante hejmen kun sia bareleto sur sia ŝultro, glitis; la bareleto falis en la riveron. Li ne povis senatende rekuperi ĝin pro alveno de vintro: la rivero frostis. Venontan printempon, li rekuperis sian bareleton. En la vilaĝo kiam li malfermis ĝin, li pensis ke la vino malbongustiĝus. Sed ĉiuj estis surprizitaj, ĉar ŝaŭma kaj bonega riveliĝis la vino!

La fermentado fariĝas sen fermentilo, ĝi malrapide komencas en kuvego; ĝi reguliĝas per la malvarmo, nula grado, sammaniere kiel la popolo Voconces kiu metis siajn bareletojn en frostajn riverojn; ĝi minimume daŭras de unu ĝis du monatoj, antaŭ ol la sukervinbero komplete transformiĝas al alkoholo.

Oni boteligas la vinon kaj konservas ĝin en kelo je 12 gradoj, dum proksimume kvar monatoj. La fermentado ĉesas kiam la vino atingas 7 ĝis 9 gradojn de alkoholo. La sukero de la « clairette » originas nur el vinberoj, sen likvoro almetita, kontraŭ la metodo ĉampagna.

La vitoparo « tradition » originas el belegaj vinberoj moskatelaj, ĝi aldonas bukedon aromaĵan de moskatelo, de liĉio kaj de rozo.

Claudine la unua

La E-klubo de **Guingamp** jesis post gustumprovo kune!

El niaj kluboj

ESPERANTO EN ENSSAT de LANNION



Les 1A (première année), photo 2014

De tri semajnoj okazas la unua oficiala kurso de Esperanto en ENSAT (por-inĝeniera lernejo) de Lannion.

Naŭ studentoj de la dua jaro komencis studi Esperanton en februaro 2013, po du horoj ĉiusemajne, kiel dua fremda lingvo. Maja Meriaux instruas ilin laŭ la metodo « Kunvojaĝu », de Paul Gubbins.

La studentoj lerte kaj entuziasme plonĝis en la esperantan banejon. Al ili bone konvenas la logika strukturo de la lingvo. Ili entute ricevos 60 horojn da lernado ĝis januaro 2014, kaj eble je la fino trapasos KER-ekzamenon.

Ĉiuj el ili jam aŭdis pri Esperanto danke al la nun fama Lingva Festivalo, kiu okazis la kvaran fojon en ENSSAT, la 17an de februaro. Tiun jaron, 25 lingvoj estis prezentataj. Vera sukceso!

"Aktualaĵoj"

Ĉu iu el vi rigardis la filmon pri P.M.A.? Tiu filmo videblis sur la dua televidkanalo merkredon, la 9an de januaro, sekvis debato.

La filmo rakontis vivon de paro kiu ne kapablis generi infanon.

Do, post multaj klopodoj, ili vojaĝis al Meksikurbo por trovi virinon kiu bonvolus naski ilian infanon.

Krome, naskiĝis du bebinoj!

Tamen, ili malfeliĉis ĉar iliaj kvar-aĝaj ĝemelinoj komprenis la malbonan situacion de la gepatroj. Elodie kaj Antonio klare parolis al siaj filinoj pri iliaj naskiĝoj.

La franca administracio daŭre okazigas severajn kaj gravajn problemojn pri la nacieco de la infanoj kaj multaj diversaj aferoj.

De tempo al tempo, ili diskutis, iomete disputis. Tamen, mi pensis alimaniere ol ili.

Dum la filmo, mi subite aŭdis "strangan lingvon". La edzo dolĉe parolis kaj konsolis sian edzinon esperante!

Resumoj

-Pri la filmo : titolo "Malpermesitaj infanoj"

Elodie kaj Antonio revas krei familion. Sed ili malkovras obstaklojn fronte al siaj deziroj : Elodie estas malfekunda, ŝi ne posedas uteron. Emociiĝinta pro tiu situacio, la paro serĉas solvon.

-Benoît Duquesne, la ĵurnalisto, tra-kondukis debaton pri "Infano por ĉiuj".

Estas malpermesita en Francio, pro bioetika leĝo, la graveco profitele al aliuloj- tio estas sin turni al iu "portanta patrino"- sed leĝas en aliaj landoj.

Ĉu esti gepatro limiĝas al biologia demando?

Se vi havas okazon, spektu tiun filmon tre interesa kaj emociiga.

Tatuavino, **Pluezeko**, januaro 2013

Poemo

En mia koro estas mia vundo
Stampita de mia juneco
Ĉar, ve, tiun kiun mi amis
Tion kion mi amas, li ne amis.

Li amis nur urbon,
La grandan maron kaj malproksimaĵojn;
Mi amas nur kamparon
Belecon de kamparoj de Bretonio.

Inter du amoj mi devis elekti
Amon de Patrujo, amon de viro,
Al mia lando mi oferis mian vivon,
Kaj foriris tiu kiun mi amis.

De tiam mi neniam revidis lin,
Neniam havis novaĵojn de li.
En mia koro sangas la vundo
Ĉar tion kion mi amas, li ne amis.

Ĉiu devas vivi sian destinton,
Tiel iras la mondo.
Konfuzita, ja, estis mia koro,
Sed tion kion mi amas, li ne amis.

Por li, honoroj kaj ricevoj
Por mi, malestimo kaj modesta vivo.
Sed mi interŝanĝus kontraŭ nenia trezoro
Mian landon, mian lingvon, kaj mian liberecon.

Esperantigis Martine, klubanino de

Guingamp

Ĉu iu povus versigi tiun tekston por esperante kanti ĝin?

El niaj kluboj

ARMOR-ESPÉRANTO

Ni, esperantistoj, kunlaboru kun neesperantistaj organizaĵoj

De kelkaj jaroj Armor-esperantanoj decidis malsame komuniki pri Esperanto tra niaj agadoj, en nia departemento "Côtes d'Armor". Tiucele ni kuniĝis kun tiuj kiuj bezonas-bezonos komuniki kun eksterlandanoj, konsekvence al kiuj utilos ege praktika ilo, kompreneble Esperanto.

Jen kelkaj iniciatoj por konigi la internacian lingvon kaj ĝiajn uzo-eblecojn, iniciatoj kies rezultoj atestis la trafekon: dissendo de flugfolioj al junuloj, la festivalo de lingvoj en Lanjono, la komunikado pri la Pluezekaj Renkontiĝoj, la budo-zorgo en la foiro Biozone, la kunlaboro kun asocioj ATTAC 22 kaj la MJC (kulturo-junulo-domo) en San Briego por la prelego de Jasuo Hori, la parta traduko de la blogo de "la ĝardeneto de la lernantoj" ("le petit jardin des écoliers") kaj la subtitoligado en Esperanto de la filmo "la ĝardeneto de lernantoj" kies eldono okazos en februaro 2013.

En Dinano, Lanjono kaj San Briego, ni obligas kontaktojn kaj kunlaborojn kun junulejoj (FJT -Loĝejoj por Junaj Laboristoj-, MJC, liceo E. Renan en San Briego, ENSAT - altlernejo pri elektrotekniko - kaj liceo en Lanjono) ; ni tie proponis kursojn, prelegojn, informojn pri Esperanto.

Ekde 2011, Armor Esperanto aniĝis al RÉSIA (Réseau pour la Solidarité Internationale d'Armor, tio signifas: reto por internacia solidareco en Armor). Tial nia asocio povas uzi ĝiajn komunikilojn, (ekz. paĝon en retpaĝaro), formadojn; plie ni interŝanĝas kun pli ol 50 aliaj asocioj pri la komplekseco de la internacia helpo.

De januaro 2013, nia asocio estas reprezentita ĉe la oficejo de la departementa registaro kiu zorgas pri la eŭropaj rilatoj « Guid'Europe » (« Eŭropo-ĝvidado ») ; tial, kadre de la evento « d'Europe et d'Armor » (« de Eŭropo kaj Armor »), kiu celas informi ĉiujn publikojn pri ĉiuj departementaj iniciatoj pri rilatoj kun niaj eŭropaj najbaroj, ni konigos niajn eŭropajn agadojn : akcepto de Veronika, juna hungara esperantistino en majo kaj junio, sed ankaŭ la venonta studperiodo kiu okazos en San Briego la 8-9an de junio. Pro tio, nia Administra Konsilio intencis senpagi la aliĝon al la malpli ol 30-jaraĝaj junuloj.

Tiuj iniciatoj ekfunkcias : Esperanto nun estas konata vorto de anoj de RÉSIA kaj MJC ktp ; ekde februaro en ENSSAT (altlernejo pri elektroniko, informatiko kaj opto-elektroniko) en Lanjono, 8 studentoj elektis Esperanton kiel nedeviga lingvo.

Por Armor Esperanto, Phillipe Stride, Laurent Peuch

Herbignac-Esperanto

Herbignac, ĉu vi jam konas ?... Kie situas Herbignac? Sude de Bretonio ĉe limo inter Morbihan kaj Loire-Atlantique.

Esperanto aperis tie en 1989, kiam tri tieaj loĝantoj eklernis la Internacian Lingvon.

Septembre 1991 okazis tie la unua inform-kunveno en urba salono helpe de Jeannine kaj Ferdi Vince, instruistoj kaj kun-fondintoj de Esperanto-SAT St-Nazaire. Ankaŭ Poullette kaj Charles Le Floch el la sama urbo ĉeestis la kunveno - nun la tri unuaj forpasis.

Tuj ekestis semajnaj kunvenoj en Herbignac kun averaĝe 4-5 partoprenantoj. Ĝis 2004 ĉio organizita pri Esperanto-vivo en nia urbo okazis kadre St-Nazaire Esperanto-SAT.

En 2005 estis fondita Herbignac-Esperanto. Se dum du jaroj ĝi enkalkulis ĝis 13 aliĝantoj, ve! 7-8 estas pli regula nombro en ĝiaj vicoj.

La asocio akceptis preskaŭ ĉiujn prelegintojn, kiuj agadis kadre de FEB.

Plurfoje ni akceptis ankaŭ eksterlandanojn, ĉu personaj korespondantoj, ĉu konatoj aŭ tutsimple petintoj pri gastigado. Entute la tieaj esperantistoj travivis belajn spertojn danke al la Internacia Lingvo.

Ekde 2005 ni organizas ankaŭ jaran piknik-tagon, en kiu partoprenas proksimume 18 ĝis 24 homoj ankaŭ el najbaraj grupoj. Dankon al ili!

Ankaŭ vi partoprenu **la venontan piknikon.**

Ĝi okazos la 2-an de junio 2013.

Kutime rendezuo estas fiksita je la 10-a30... Post akcepta aperitivo kaj manĝo estas antaŭ-planita vizito de iu loka vidindaĵo...

Ĉi-jare ni prefere plu sekretu, tamen vi sciu, temos pri loka historio... Sed ŝŝ!...

Pli precizaj informoj pri tio, vi ricevos baldaŭ tra la FEB-informlisto.

Do, ĝis baldaŭ en Herbignac!

Tel: 02 40 88 96 98 ; Rete: jys.mys(a)club.fr

Jys

 ★ La **Pluezeka Esperanto-Asocio** estas amike
 ★ ĝemeliĝinta kun Nepala Esperanta Asocio.
 ★ Ĝis nun, 3 nepalanoj partoprenis en Plueze-
 ★ kaj Renkontiĝoj kaj 8 partoprenantoj de nia
 ★ pluezeka semajno vizitis Nepalon.
 ★ Razen Manadhar, Poshraj Subedi kaj Naren-
 ★ dra Battarai, niaj nepalaj amikoj, organizas
 ★ internacian ekskurson en Nepalo kaj Barato
 ★ kiu okazos en Novembro 2013.
 ★ Vi povas legi informojn pri tiu ekskurso en
 ★ tiu retejo : <http://ekskurso.blogspot.fr/>
 ★ Pluraj el ni planas ree viziti Nepalon, ĉu vi ?
 ★ *****

Bretona tradicio

TRADICIA ĈEVALFESTO



En Bretonio, antaŭ la traktoralveno, neniu dombesto profitas tiom da diligentaj zorgoj kiom la ĉevalo. Ĝi simbolas gravan kapitalon, ĉar ĝi estas la ĉefa laborilo sur la kamparo. Unuflanke, ĝi utilas kiel laborforto kaj povas transporti ĉiujn ajn varojn, aliflanke, la ĉevalino naskas idon, kiu alportas freŝan monon al la kamparano.

Oni taksas ies bienriĉecon laŭ la nombro de la posedataj ĉevaloj (1). Ankaŭ la fizikaj kvalitoj de la besto havigas al la proprietulo gravan prestiĝon. Ĉevalo membras en la familio. Oni nomas ĝin sufiĉe ofte per nomo de heroo: Bayard, Napoleon, Ulysse... kiam, por la ĉevalino, oni elektas dolĉan inan nomon: Cybelle, Charmante... Estas la viroj mem, kiuj zorgas pri la ĉevaloj: ĉiutage ili brosas, karesas, striglas, tualetas ĝin dum la virinoj zorgas pri la bovinoj. Antaŭ ol sidi ĉe la tablo, la mastro donas al ĝi ĝian avenporcion kaj la plej bonan fojnon.

Pro tio, perdo de ĉevalo estas financa kaj sentimentala katastrofo. Tiuepoke, la kuracarto ankoraŭ ne tro disvolviĝis sur la bretona kamparo kaj la kamparano, forte ligita al la religio, lokas ĝin sub la protekto de iu "sankta kuracisto": Eloi, Alar, Hervé, Gildas... Unufoje jare, li kondukas ĝin al malgranda, kampara sanktejo, multnombraj en Bretonio, kie okazas tradicia, bretona "pardon". En Bretonio, oni nomas "pardon" religian feston, kiu okazas, je difinita dato, en sanktejo por omaĝi kaj preĝi la surlokan, sanktan patronon.

(1) "Antaŭe oni diris ke kamparano kiu kapablas estri kvar-ĉevalan bienon kapablas regi reĝlandon." (Angela Duval.)

Ĝi inkludas religian feston: meso, procesio, diversaj benoj... sed ankaŭ profanan feston: diversaj distraĵoj, fortopostulaj ludoj, dancoj, globoj... En Bretonio, ĉiu vilaĝo, eĉ la plej malriĉa, posedas kapelon, kie okazas tiu festo.

Tiuj religiaj festoj valorigas kaj kvietigas la bretonan kampulon. Estas privilegia momento por peti helpon kaj protekton de la sanktulo. Por altiri al si la bonfaran efikon de la sanktulo, la pilgrimanto kaj lia ĉevalo devas plenumi kelkajn religiajn ritojn. Beno de la ĉevalo kaj aspergado ĉe la fontano gravas ĉar akvo estas magia substanco, kiu fekundigas kaj kuracas la beston. Ankaŭ, oni aldonas profanajn ritojn: (donaco de mono, de krino, de huffero...)

"Pardon" en Notre Dame de l'Isle.

Tiu tradicia "pardon" ankoraŭ ekzistas ĉe la kapelo "Notre Dame de l'Isle", situata inter Lanvollon kaj Guingamp sur la komunumo Gouédelin. Tiu kapelo staras sur la kamparo, en verda juvelujo, kiu ankaŭ entenas kalvarion, fontanon kaj lageton. Ĝi estis konstruita de la monaĥoj de Beauport en la dekkvina jarcento. Tiuepoke, protekto de la sanktulo estis ĉefa por la kamparano antaŭ la someraj rikoltoj. La benado kaj la banado protektis la beston kontraŭ ĉiaj malsanoj aŭ vundoj kiuj povus malhelpi la rikoltadon.

Bretona tradicio (sekvo)

Sed la modernaj tempoj lasis siajn spurojn... kaj la kamparanoj, iom post iom, forlasis la ĉevalojn profite al la traktoroj. Nun, tiu ceremonio pli koncernas la selĉevalojn ol la laborĉevalojn, tamen, oni povas ankoraŭ admiri kelkajn belajn bretonajn specimenojn. Eĉ se la evento ne plu havas la saman signifon, la bestoj, tamen, ne eskapas la tradician banadon !

Nun, la religia "pardon" okazas la duan juliodimancĉon, daŭras tri tagojn kaj rendevuas ĉiuj amatoroj pri ĉevaloj kaj akvaj ludoj.

Sabate, torĉa procesio sekvas ĥorkoncerton kaj diservon, poste, okazas eksterordinara kutimo : anĝelo, tenante fajran kandelegon, surdrate malsupreniras el la sonorilturo ĝis la pretigita ŝtiparo. Ambaŭ, la pastro kaj la urbestro ekbruligas la ŝtiparon kaj grupo de tradiciaj muzikistoj salutas la ĝojfajron.



Dimanĉe ree okazas religia festo (meso) kaj posttagmeze en la centro mem de la vilaĝo, okazas la profana festo : tio estas foira kaj brokantaĵa festo.

Lunde, oni omaĝas al Sankta Eloi, sankta patro de la ĉevaloj kaj de la forĝistoj. Li staras en multaj, bretonaj kapeloj tenante sian martelon unumane kaj (laŭ la legendo) la "tranĉitan piedon" de la ĉevalo aliamane.

La ĉevalfesto estas okazo por la kamparano elmontri sian bredistan fierecon. Ofte, li plektas la krinaron kaj la voston de la besto, eĉ aldonas kolorajn rubandojn kaj fiere paradas antaŭ la homamaso.

Matene, post la diservo, la pastro benadas la ĉevalojn kaj la rajdantojn. Poste, akompanataj de la tradiciaj muzikistoj, unu post la alia, la rajdantoj provas eniri la lageton. Kelkaj ribelemaj ĉevaloj postulas persvadajn gvidantojn.

Por la spektaklo, en bona kaj gaja humuro, sekvas akvaj konkurbataloj, kies celo estas elseligi la opozician rajdanton. Kelkaj kuraĝuloj, rajdante la saman ĉevalon, provas fari piramidon kaj, por la plej granda plezuro de la spektantoj, tio finiĝas per komuna akva falo. Ĉe la pinta momento de la spektaklo, kiu daŭras pli malpli unu horon, kelka dudeko da ĉevaloj padelas kaj naĝas en la lageto.

Post la elirado de la ĉevaloj el la lageto, okazas la paradmarŝado de la urbaj " Reĝinoj " .

Akompanataj de la bretonaj tradiciaj muzikistoj, de la urbestro, de la urba konsilio, de la ĉevaloj kaj la rajdantoj, la kunirantoj, sub la aplaŭdoj de la homamaso paradas tra la stratoj de la vilaĝo.

Je tagmezo, en varma etoso, kampara manĝo kuniĝas ĉiujn ĉirkaŭ grandaj tabloj. Infanoj, plenkreskuloj, maljunuloj, ĉiuj, meze de ridoj, krioj, ĝoje frandas la apetitdonan manĝaĵon. Endas reakiri fortojn ĉar posttagmeze ree okazos diversaj bretonaj ludoj kaj distraĵoj : globkonkurso...

La tradicia ĉevalfesto, en, kaj ĉirkaŭ la bretonaj kapeloj, estas grava momento de la komuna, ama historio inter la kamparano kaj lia ĉevalo.



Jeanne. Pluezek

Fontoj : prelego de Daniel Giraudon

Tri lingva rakonto

SAO 'TA YANNIG

Yannig veze greet anezañ. Eun ano brao evid eur potrig, med ar paour-kêz Yannig ne vedo ket 'vel ar re all : distummet oa e vemprou gand ar polio, hag ablamour da-ze tremene eul lodenn vad euz e amzer azezet en eur gador-war-rojou. Klask a ree koulskoude bale muioc'h mui gand sikour flahou, ha, beb an amzer zo-kén, e veze hardiz a walc'h evid mond e unan-penn heb sikour e-béd euz an eil penn d'egile euz ar porzskol.

En deiz-ze, goude ar préd, e-noa Yannig lakeet en e benn treuzi ar porzskol, en eur vale heb sikour den na tra, rag c'hoant e-noa kutull eut vleunienn gaer a wele du-hont e traoñ ar voger e-kichenn an hent braz. Brao oa an amzer, ha Yannig, euz uhelder e zeg vloaz, a 'n em zante barreg da dreuzi ar porzskol heb e flahou.

Ar c'hammedou kenta a yeas brao. Chilgammad a ree eun tamm, med ne ree ket 'forz : mond a rafe beteg ar voger du-hont. Petra a lakeas anezañ da horjella, hag, a-benn ar fin, da goueza war e reor ? N'ouzon ket, nemed e vefe eun tammig aon o santoud sempladrez e zivesker. Ha setu eta or Yannig kouezet war leurenn ar porzskol, ha den e-béd war-dro. Kaer e-noa selled a-gleiz hag a zehou, ne deue den e-béd. Klask a reas sevel war bouez e ilinou, med re ziêz e oa... hag e krogas da leñva.

LEVE-TOI DONC, YANNIG

On l'appelait Yannig. Un joli nom pour un petit gars, mais le pauvre Yannig n'était pas comme les autres : ses membres étaient déformés par la polio, et c'est pourquoi il passait une bonne partie de son temps assis dans un chariot. Il cherchait pourtant à marcher de plus en plus à l'aide de béquilles et parfois même il était assez hardi pour aller tout seul, sans l'aide de personne, d'un bout à l'autre de la cour d'école.

Ce jour-là, après le repas, Yannig s'était mis dans la tête de traverser la cour en marchant sans aide d'aucune sorte, car il voulait cueillir une fleur qu'il voyait là-bas au pied du mur, près de la grand' route. Il faisait beau, et, Yannig du haut de ses dix ans, se sentait capable de traverser la cour sans ses béquilles.

Les premiers pas allèrent joliment. Il boitillait un peu, mais il s'en fichait : il irait jusqu'au mur là-bas. Qu'est-ce qui le rendit chancelant et au bout du compte, le fit tomber sur le derrière ? Je ne le sais pas, à moins que ce ne soit un peu de peur en constatant la faiblesse de ses jambes. Et voici donc notre Yannig tombé sur la cour de l'école et, personne alentour. Il avait beau regarder à gauche et à droite, personne ne venait. Il essaya de se lever à l'aide de ses coudes, mais c'était trop difficile... et il se mit à pleurer.

VI STARIĞU, YANNIG

Oni nomis lin Yannig. Bela nomo por malgranda knabo, sed la mizera Yannig ne estis kiel la aliaj : liaj membroj estis misformitaj pro poliomyelito, tial li pasigis grandan parton de sia tempo sidante en rul-seĝo. Li tamen provis marŝi pli kaj pli pere de lambastonoj kaj kelkfoje li estis sufiĉe maltima por iri sola, sen ies helpo, de la komenco ĝis la fino de la lerneja korto.

Tiun tagon, post la manĝo, Yannig decidis trapasi la korton marŝante sen ajna helpo, ĉar li volis pluki floron kiun li vidis tie antaŭ la muro apud la granda strato. Estis bela tago, kaj Yannig, dek-jara, sin sentis kapabla transiri la korton sen siaj lambastonoj.

La unuaj paŝoj pasis bone. Li iomete lamis, sed li ne zorgis : li irus ĝis la muro tie for. Kio ŝancelis lin kaj fine faligis lin sur la postaĵon ? Mi ne scias, krom eble ke li timis, konstante la malfortecon de siaj kruroj. Kaj jen nia Yannig falinta sur la korton, kaj neniu ĉirkaŭe. Li rigardas dekstren kaj maldekstren, sed neniu venis. Li provis stariĝi, helpante sin per siaj kubutoj, sed estis tro malfacile, kaj li ekploris.

Extrait des Chroniques « Soubenn an tri zraig de Job an Irien – Minihi Levenez 29800 Tréflévenez

Tri lingva rakonto (sekvo)

Pa zavas e benn goude eur pennadig, e welas dirazañ an diorenner e-noa ar garg anezañ. Erruet 'vedo heb ober trouz. Yannig a zoñjas e vedo saveteet. Seha a reas e zaelou, ha lavared d'ar pôtr yaouank : "Sikour ahanon da zavel !" Med hemañ a respontas : "Nann Yannig, sao da u-nan !"

Kounnari a reas ar pôtrig, ha blejal ha lenva doureg. An diorenner a oa aze atao ; ne 'noa ket lohet ; o selled ouz ar potrig, e lavaras dezañ en-dro ; "Yannig, sao da-unan !" Yannig a gomprenas ne vije ket lakeet en e-zav, ha ne 'noa ken nemed eun dra da ober : klask sevel drezañ e-unan, forz pegen diêz e vefe.

Hag e oe gwelet a-benn eur vunutenn bennag ar pôtr o sioulaad hag o 'nem lakaad da boueza war ilinou. E benn-a-dreñv a zavas a-nebeudou diwar al leur. Krena a ree ar pôtr hag ar c'hwezenn a ziruille diouz e dal, kement a nerz a lakee d'en em lakaad en a zav. Hag a-greiz pep kreiz setu ar pôtr Yannig sonn war e gillourou, gand eur mousc'hoarz ledan war e vuzellou, hag e youhas d'ar pôtr yaouank : "Lavared a ri dezo on savet va-unan, kea !"

Ar pôtr yaouank ne 'noa ket lohet. Daoubleget 'vedo atao, hag e kendalhe da bara e zaoulagad war Yannig, heb lavared ger. Eur vunutenn hir a dremenas evel-se ; selled a reent an eil ouz egile. A-benn ar fin e oe kleved yannig gand eur vouez sioul o tistaga : "Sikouret-peus ahanon memestra."

Quand il releva la tête au bout d'un moment, il vit devant lui son éducateur. Celui-ci était arrivé sans faire de bruit. Yannig pensa qu'il était sauvé. Il sécha ses larmes et dit au jeune homme : « Aide-moi à me lever ! » mais celui-ci répondit : « Non Yannig, lève-toi tout seul ! ».

Le petit gars se mit en colère, il cria et pleura à chaudes larmes. L'éducateur était toujours là, il n'avait pas bougé : regardant le garçon, il lui redit : « Yannig, lève-toi tout seul ! » Yannig comprit qu'on ne le mettrait pas debout et qu'il n'avait plus qu'une chose à faire : essayer de se lever tout seul, quelle que soit la difficulté.

Au bout d'une minute environ, on vit le garçon se calmer et se mettre à appuyer sur ses coudes. Peu à peu son derrière décolla du sol. Il tremblait et la sueur dégoulinait de son front tellement il mettait d'énergie à se lever. Au milieu de tout, voici le gars Yannig debout sur ses jambes ; il cria au jeune homme : « Tu diras, hein, que je me suis levé tout seul ».

Le jeune n'avait pas bougé. Il était toujours accroupi et continuait à regarder Yannig sans rien dire. Une longue minute s'écoula ainsi ; ils se regardaient l'un l'autre. Au bout du compte, on entendit Yannig déclarer d'une voix calme : « Tu m'as aidé quand même ! »

Kiam li restarigis la kapon post momento, li vidis antaue sian edukiston. Tiu çi alvenis senbrue. Yannig pensis ke li estis savita. Li sekigis siajn larmoijn, kaj diris al la junulo : « Helpu min por stariği ! » Sed tiu çi respondis : « Yannig, stariğu tute sola ! »

La knabo ekkoleris, kriis, kaj abunde ploris. La edukisto daure estis tie, li ne foriğis : rigardante la knabon, li rediris : "Yannig stariğu tute sola !" Yannig komprenis ke oni ne starigos lin, kaj li devis provi leviği tute sola, kia ajn estis la malfacileco.

Post proksimume unu minuto, la knabo kvietiğis, kaj apogante sin sur siaj kubutoj, iom post iom lia postafo leviğis de la grundo. Li tremis kaj la švito disfluetis de lia frunto, tiel li energiis por stariği. Subite li staris. Li kriis al la junulo : « Vi diros ke mi stariğis tute sola ! »

La junulo ne estis moviğinta. Li plu kaüris kaj daürigis rigardi Yannig sen ion diri. Unu longa minuto pasis tiel, ili sin rigardis reciproke. Je la fino, oni aüdis Yannig deklari kviete : « Vi helpis min tamen ! »

Yves Royou

La règle d'or en pédagogie n'est-elle pas : Toute aide inutile est cause de retard ?

Ĉu la ora regulo en pedagogio estas : Ĉiu neutila helpo estas kaŭzo de malfruo ?

Aktivajoj de Interkant'



Interkant' prezentos « ĉirkaŭ KARMEN »

6 fojojn en 2013, unuan fojon dum la SAT-amikaro kongreso en Métabief la **31an de marto**
kaj en Pluezek la **18an de aŭgusto 2013**

Tekstoj : Franjo LEVEQUE

Enscenigo : Monique LUCAS

Recitantoj : Franjo LEVEQUE , Robin BETO

Solistoj : Zdravka LENEPVEU, Maja CORNUEJOLS, Franjo LEVEQUE, Laurent PEUCH

Pianisto : Murielle VEDRINE

La spektantoj paŭt-ignoris la prezenton kaj « Carmen » konis nenian sukceson je la komenco. Tamen « Carmen » estas taksata kiel la floro de la franca romantismo, kaj plu restas ankoraŭ nun la plej ludita opero en la mondo.

La direktoro de la pariza Komika-Operejo, antaŭsentis tiun malsukceson. « Carmen ! La Carmen de Mérimée !... Ĉu ŝi ne estas mortigita far sia amanto ?... kaj tio meze de ŝtelistoj, de bohemianoj, de cigaristinoj !... En la Komika-Operejo !... la teatro de familioj !... la teatro de intervidiĝoj de geedziĝo !... Ni luis, ĉiujn vesperojn, kvin aŭ ses loĝiojn por tiuj antaŭvidiĝoj... Vi forfuĝigos nian spektantaron... ne eblas ! (...) Mi petas vin, provu ke ŝi ne mortu. Morto en la Komika-Operejo !... neniam oni vidis tion... ĉu vi aŭdas ? Neniam ! ... faru ke ŝi ne mortu !... mi petas vin mia kara infano... »

Akto 1

En urbo Séville, antaŭ la dragonkazerno de Alcala, la brigadiston Don José, fianĉon de juna Micaëla, alkantas bohemiano Carmen per Habanera kanto, kaj ĵetas al li floron.

Iom poste okazis kverelego inter cigaristinoj, sekve Carmen estas arestita, kaj ŝin gardi havas la taskon Don José. La ĉarmulino findelogas la brigadiston, kaj promesas amon al li, se li lasas ŝin forfuĝi. Ensorĉita de Carmen, Don José liberigas ŝin, kaj pro tio lasas sin enkarcerigita – sciante ke li retrovos ŝin.

Aktivajoj de Interkant'

Akto 2

En la taverno de Lilas Pastia, rifuĝejo de kontrabandistoj, Carmen atendas Don José, nun libera, sed toreadoro Escamillo, arogantega, intencas siavice brili al ŝi.

Don José estas disŝirita inter emo al devo kaj neregebla amo al Carmen. Ĉi tiu mokas lin, klarigante ke ŝi ne amas lin. Don José falas ĉe ŝiajn piedojn kaj deklaras sian amegon al ŝi.

Don José definitive rekuniĝas kun la banditoj, sola solvo por resti proksima al Carmen, sed li montras sin pli kaj pli troposedema pri ŝi. Carmen scias pri la minaco kiu pezas sur ŝi, pro la ĵaluzo de Don José kiu premeblas kaj sufokigas ŝin.

Akto 3

Carmen amrompis kun Don José, kaj flirtas nun kun Escamillo. Micaëla mem reekallogis Don José.

Akto 4

Don José, konfuzita kaj senespera de kiam li forlasis Carmen, gvas sian malnovan amantinon ; li insiste petegas Carmen, sed la bohemiano, avida je libereco, nenion volas aŭdi : preferinde morti ol cedi ! Furioza vidi ŝin surda pri liaj krioj, Don José estas kvazaŭ freneza. Li minacas ŝin lastfoje, kaj frapas ŝin plenkore.

« Mortigis ŝin mi, amegatan Carmen mian », konfesas li senreziste arestita.



Ŝpinis tiun spektaklon Franjo Lévêque, ĥorestrino. Post la lasta spektaklo en decembro 2013 ŝi forlasos la poston....Finpretigis la spektaklon dum kvar longtempaj semajnfinoj **Interkant'** : en Grésillon, en Bouresse, en Toulouse, en Saint-Brieuc.

Venontaj spektakloj :

- Vendredon la 10an de Majo 2013 en Artigues-près-Bordeaux (inter-asocia kongreso)
- Dimanĉon la 23an de junio 2013 en Bouresse
- Dimanĉon la 18an de aŭgusto 2013 en Plouézec
- Dimanĉon la 3an de novembro 2013 en Ariège
- Dimanĉon la 15an de decembro 2013 apud Le Mans

Apartajn varmajn dankegojn al ĉiuj kiuj helpis iamaniere :

- F. Toubale, M. Redoulez, M. Duc-Goninaz, R. Cash, B. Legeay, B. Behra, S. Sire, JP. Ducloyer, Jorgos, M. Pancorbo.
- Komitatoj de Bouresse kaj de Grésillon.
- Interkant' kaj la solistoj, parolantoj kaj muzikistoj.

Subvenciis la laboron :

Esperanto-France, Sat-Amikaro, Armor-Esperanto, bretona Federacio, Plouézec, Esperanto-94, Esperanto-Gironde, Esperanto-Anjou.

Vojaĝi dank'al Esperanto

VOJAĜO AL MARIBOR de Hubert kaj Maja 28a de decembro 2012 ĝis 5a de januaro 2013

Slovenio estas malgranda lando kun granda kulturo. Ĝi estas parto de la eks-Jugoslavio kun Kroatio, Serbio, Bosnio, Makedonio, kaj Montenegro.

Maja kaj mi vojaĝis al Maribor por revidi Zdenka-n, esperantistan amikinin kiun Maja renkontis en Ĉinio en januaro 2012. Maribor estas proksima de Aŭstrio. Ĝi estas ĉirkaŭita de montaroj, kie oni povas skii. Ni flugadis du horojn de Paris al Ljubljana. La aviadilo flugis super montoj kun neĝo. Estis tre bela pejzaĝo sub suno.

Dum 2012, Maribor estis la Eŭropa Ĉefurbo de la Kulturo. Pro tio, okazis multaj kultureventoj, koncertoj, baletoj, pentrafekspozicioj, stratspektakloj, ktp... Kiam ni alvenis, ĉio tio estis finita, sed oni povis trovi en la urbo multajn spurojn de tiuj eventoj.

Maribor estas malnova urbo, kun multaj belegaj preĝejoj. Ni konstatis ke la religio estas pli forta ol ĉe ni. Ni admiris tre belajn kriptojn, speciale unu tute farita el pajlo. En la centro de la urbo, oni trovas multajn malnovajn konstruaĵojn kaj grandajn parkojn.

En la stratoj, malgraŭ la malvarmeco (minus tri la unuan tagon) ni renkontis homamason, kaŭze de la novjara festo. La homoj kutime trinkas kafon aŭ teon aŭ varman vinon ekster la kafejoj, sur la terasoj. Sur la seĝoj, kovriloj estas uzablaj.

Sed Maja kaj mi ne restis ekstere: ni ofte eniris la kafejojn por trinki bonegan varman vinon (ruĝan aŭ blankan.) kaj ankaŭ por varmigi nin.

Interparoli en Slovenio facilas ĉar multaj junuloj parolas la anglan, ĉiuj estas tre afablaj. Ĝenerale, la prezoj estas iomete malpli altaj ol en Francio. Ni ne estis perditaj ĉar oni trovas la samajn markojn kiujn oni trovas en Francio: Leclerc, Spar, Renault, Citroen, LIDL, Credit Agricole, ktp...

Ni piediris tra la bazaro kie multaj kamparanoj vendis siajn produktojn: legomojn, acidan brasikon (kiun slovenoj tre ŝatas), mielon, vinon, sekajn fazeolojn, ktp...

Ni estis bonege akceptitaj de niaj esperantistaj amikoj. Unue, Zdenka donacis al ni tian amason da donacoj ke ni preskaŭ estis ĝenitaj. Due, Stanka, kiu ankaŭ estis en Ĉinio, sed ne bone parolas Esperanton, invitis nin por manĝi vespermanĝon je la 5a posttagmeze. Tiunmaniere, ni eksciis ke la slovenoj manĝas je ia ajn horo de la tago. Trie: mirinda esperantista familio, ĉe kiu ni pasigis la novjaran nokton.

Ili loĝas en domo de la Tito-epoko. La festo okazis en aranĝita kelo kiu estis esperantista loko. La gevoj devenis de Serbio. Vesna, ilia filino, havas filon, Vlada, 12-jaraĝa, kiun ŝi edukas sola. Pere de Esperanto, ŝi renkontis sian novan rusan kunulon. Dum la ferioj, brazila junulo estis gastigata (ni parolis al li pri Igor kaj Bona Espero, sed li ne konis. Li loĝas en Rio de Janeiro). Ĉiuj tre bone parolis Esperanton, tro rapide por mi kaj eĉ por Maja.

La festa etoso estis varma. Ni bone manĝis, kantis, ridis, aŭskultis esperantistan muzikon. Je la dua matene, Vladimir, la kunulo de Vesna, petis de Maja kaj mi ke ni kantu «La Marseillaise». Mi respondis: «Mi ne tro ŝatas tiun kanzon, sed mi povas kanti «L'internationale». Mi ekkantis kaj ĉiuj kuniĝis kun mi en sia lingvo (esperanta, brazila, rusa, slovena kaj franca). Estis belega momento de komuniĝo, kie oni vere sentis humanismon kaj fratecon inter esperantistoj. Ekstere, eksplodis petardoj kaj piroteknikaĵoj, dum la tuta nokto.

Ni eksciis, kun niaj amikoj, ke multaj slovenoj bedaŭras la epokon de Jugoslavio. La vivo estas vere malfacila, pro la ekonomia krizo. Ekzemple en Slovenio, 50% de la junuloj ne havas daŭran laboron. La filo de Zdenka (40-jaraĝa) estas juristo, sed ĝis nun, preskaŭ neniam laboris. Li havas nur pension de 260 eŭroj por monato.



Kun la familio de Vesna, ni promenadis dum unu tago sur la montaro Pohorje, kie restis iomete da neĝo.

Kompreneble, ni konservos bonegan memoron de tiu vojaĝo. Ni pensas ke niaj esperantistaj amikoj estus ĝojaj gastigi aliajn vizitantojn.

Hubert Mériaux

Agendo 2013

17 mars : Assemblée Générale à Loudéac

Du 30 mars au 2 avril : **68ème Congrès de SAT-Amikaro** à Métabief, spectacle "Carmen" le 31 mars

Du 15 au 19 avril : pratique de la langue à **Kvinpetalo**

Du 20 au 28 avril : **3^{ème} semaine de printemps à la MCE**, château de Grésillon, cours intensifs et examens B1, B2, C1

Du 22 au 26 avril : stage de traduction et préparation au certificat d'études supérieures à **Kvinpetalo**

Du 29 avril au 3 mai : découverte du Haut-Poitou à **Kvinpetalo**

Du 4 au 11 mai : FRINGOJ, rencontre d'enfants (8-17 ans) à **Grésillon**

Du 04 au 12 mai : **Congrès national d'Espéranto-France** (8-11 mai) et congrès des cheminots (IFEFF) à Artigues près de Bordeaux, spectacle "Carmen" le vendredi 10 mai à 14h30

Du 13 mai au 5 juin: Tournée de Veronika (Hongrie) en Bretagne

02 juin : Herbignac-Esperanto organise sa **journée pique-nique 2013**

Du 08 au 09 juin : **6^{ème} fin de semaine d'espéranto d'Armor Eo** au lycée Ernest Renan à Saint Briec avec Elisabeth Le Dru, Josée Lafosse et une personne pour le 3ème niveau à préciser plus tard. Nouveauté : le stage d'initiation est offert aux moins de 30 ans.

Pour plus d'information : 09 53 92 77 37 et [leveque.franjo\(a\)gmail.com](mailto:leveque.franjo(a)gmail.com)

Du 11 au 14 juin : Journées japonaises à **Kvinpetalo**

23 juin : Spectacle "Carmen" à Bouresse

29 juin : AG de la société coopérative M.C.E. au château de Grésillon

Du 6 au 13 juillet : **Semaine touristique** à au château de Grésillon

Du 12 au 18 juillet: Stage de musique à **Kvinpetalo**

Du 12 au 18 juillet : Conférence d'ILEI à Herzberg am Harz en Allemagne

Du 13 au 20 juillet : **Semaine artistique** à au château de Grésillon

Du 20 au 27 juillet : **Semaine alternative** à au château de Grésillon

Du 22 au 26 juillet : Pratique de la langue à **Kvinpetalo**

Du 20 au 27 juillet : **98a Universala Kongreso de Esperanto**
Rejkjaviko, Islando

Du 28 juillet au 4 août : **86a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmondo**
Madrido, Hispanio

du 3 au 10 août : **Semaine festive** au château de Grésillon

du 10 au 17 août : **Semaine théâtre** au château de Grésillon

Du 17 au 24 août : **17èmes rencontres internationales de Plouézec**

Inscrivez-vous auprès de Mme **GALLIAN** Micheline, 28 rue Yves le Coq,
22470 PLOUEZEC (tel : 02 96 16 43 74) courriel : [micheline.gallian\(a\)orange.fr](mailto:micheline.gallian(a)orange.fr)
Site internet : www.pluezek-esperanto.net